# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 60, Numero 1, Februaro 2025*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else**

## Prelego: Esperanto - Ĉu komuna lingvo por unu pli justa mondo?

*Rainer Kurz, membro de EFNSK*

Invito al evento la 12an de Marto de la Association for Good Government kunlaborante kun Esperanto NSW. Homoj interesitaj pri Esperanto estas bonvenaj aliĝi. Dum tiu enkonduko al Esperanto en angla lingvo, ni provos paroligi vin ene de 2 horoj!

**En ĉi tiu senpaga du-hora leciono, ni traktos la jenajn:**

- **Faktoj kaj baza ideo de Esperanto**
- **Historio**
- **Forto kaj malfortoj**
- **Prononco**
- **Gramatiko**
- **Vortprovizo**
- **Kiel uzi Esperanton en Sidnejo**
- **Kiel uzi Esperanton dum vojaĝo**
- **Kiel uzi Esperanton, se vi ne ŝatas forlasi la hejmon**
- **Kiel fariĝi Esperanto-fakulo**
- **Influo al la mondo**

La instruisto, Rainer Kurz, komence lernis Esperanton dum 20 horoj ĝis li faris sian unuan Esperantan vojaĝon (al Japanio). Ekde tiam li uzas Esperanton por vojaĝi al pli ol 40 landoj.

La evento okazos en Henry George House, 1/F 122 Little Eveleigh Street, Redfern, nur unu minuton for de la Esperanto Domo. Pliaj informoj ĉe: https://eventaservo.org/e/0dfebe

## Kongreso de Esperanto kaj Somerkursaro en Adelajdo: miaj impresoj

*Minh Thong Do (Tom), membro de EFNSK*

Mi eksciis pri la somerkursaro en Adelajdo ĉe Esperanto Domo en novembro 2024. Mi dezirus plibonigi mian Esperanton kaj lerni pri Esperanto kulturo. Mi sciis ke EFNSK povas finance subteni mian vojaĝon al Adelajdo. Tio ankaŭ kuraĝigis min fari decidon.

Mi alvenis en St Ann's College la 5-an de januaro je la 10:30 matene kaj surpiziĝis ke mi ne povis eniri ĉar registrado komenciĝis nur je la 12:00.
La 6-an de januaro komenciĝis klasoj. Unue mi elektis la klason de Hoan Tran por post-komencantoj. Post tri tagoj mi konsciis ke la instruado de Hoan ne kongruas kun mia stilo de lernado. Dum la aliaj du tagoj mi

partoprenis en klaso de Trevor. Malgraŭ la nivelo de la klaso estis interese. Lerna enhavo kaj defio motivis min lerni pli.
Dum la kongreso mi partoprenis kelkajn prelegojn kaj aktivecojn. Mi ŝatis la prelegon de Marumi pri germanoj. Ŝi parolis pri antaŭjuĝo kontraŭ germanaj homoj kun diversaj religioj. Ankaŭ plaĉis al mi la kvizo de Trevor ĉar la kvizo riĉigas la partoprenantojn kun ne nur sciigo pri la mondo sed ankaŭ pri la historio de Esperanto. Kelkajn prelegojn mi tute ne komprenis kaj ne ŝatis.



En la fino mi konsciis ke la Esperanto parolantoj estas amikemaj homoj kiuj ŝatas dividi siajn sciojn kun novalvenintoj. Mi kredas ke mi multe lernis pri esperanta kulturo kaj plibonigis mian Esperanto kapablon.

## Sidneja Lingva Festivalo 2025

*Dmitrij Luŝnikov, estrarano de EFNSK*

Sabaton la 22-an de februaro okazos la Sidneja Lingva Festivalo 2025 en la Ŝtata Biblioteko de NSK. Jonathan Cooper prezentos Esperanton, Kiah Morante prelegos pri Tokipona, Richard Delamore - pri la ĉeroki lingvo de Nord-Ameriko, Adam Levy - pri la ĉorki lingvo de Nagalando, regiono de Barato. La festivalo komenciĝos je la 11:00 matene kaj finiĝos je la 16:00. Poste, je la 17:00 ĉe Esperanto Domo okazos postfesteto.
Ĉiuj estas bonvenaj!

SYDNEY LANGUAGE FESTIVAL 2025

**State Library of NSW**

**Saturday 22 February 2025**

**11 :00 am - 4.00 pm**

STATE LIBRARY NEW SOUTH WALES

| | | |
|---|---|---|
| Macquarie Room | 11:00 AM | Opening |
| | 11:10 AM - 11:55 AM | **Prof. Ghil'ad Zuckermann** (Linguist, Revivalist)<br>*Revivalistics and Aboriginal Australian languages*<br>Pama-Nyungan language family |
| | 11:55 AM - 12:00 PM | Pause |
| | 12:00 PM - 12:20 PM | **Dr Alan Downes** (Language educator)<br>*Tangut - an extinct language* - Sino-Tibetan language family |
| | 12:20 PM - 12:40 PM | **Adam Levy** (PhD candidate, La Trobe University, Melbourne)<br>*Chokri language of Nagaland, India* |
| | 12:40 PM - 12:55 PM | **Jonathan Drew** (Storytelling Performance)<br>*Tamil classical stories and music* |
| | 12:55 PM - 1:00 PM | Pause |
| | 1:00 PM - 1:20 PM | **Seán McLoughlin** (President of Irish Language School Sydney)<br>*Gaeilge san Astráil - Irish Language in Australia* |
| | 1:20 PM - 1:40 PM | **Mujahid Torwali** (PhD candidate, University of Sydney)<br>*Torwali* - Indo-Iranian language |
| | 1:40 PM - 1:55 PM | **Katarina Lonca** (founder of Adriatic Language Academy)<br>*Serbian and Croatian* - Western South Slavic languages |
| | 1:55 PM - 2:00 PM | Pause |
| | 2:00 PM - 2:20 PM | **Jonathan Cooper** (President of Esperanto NSW)<br>*Esperanto* (Constructed language) |
| | 2:20 PM - 2:40 PM | **Kiah Morante** (Language educator)<br>*Toki Pona* (Constructed language) |
| | 2:40 PM - 2:55 PM | **Theresa Fuller** (Language educator)<br>*Peranakan* |
| | 2:55 PM - 3:00 PM | Pause |
| | 3:00 PM - 3:20 PM | **Richard Delamore** (Language educator)<br>*Cherokee - Indigenous language of North America* |
| | 3:20 PM - 3:40 PM | **Lizzie Nguyen** (Harmony steps)<br>*Vietnamese language and traditional dance* |
| | 3:40 PM - 4:00 PM | **Dr Alan Libert** (Adjunct Professor, Khazar University, Azerbaijan)<br>*Crimean Tatar* - Kipchak language of the Turkic language family |

EFNSW: Esperanto Domo
Kontaktu Jonathan Cooper: 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo: 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:
Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 10:00 – 20:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*




| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Joanne Cho |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Dmitry Lushnikov |
| Estraranoj: | Terry Manley, Greg Cooper, Mark Rodowicz |